

N. N. 32,  
Burĝonis rozarbedo

*tradukita de Guido Holz*

1. Burĝonis roz-arbedo  
el delikata sin'  
laŭ olda kant-heredo,  
Jiŝaj la origin';  
ekĝermis ĉarma flor'  
dum frosta vintro-tempo  
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,  
mirinda roz-arbed',  
elvenis flor' benata  
laŭ diro de profet'.  
Laŭ sankta Di-ordon'  
ŝi naskis infaneton  
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,  
amindas per parfum';  
la nokton ĝi forpelas  
per sia brila lum',  
nin helpas el mizer',  
el pek' kaj morto savas;  
Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

N. N. 32,  
Rozbranĉo  
forĝermadis

*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauĵoj jam kantadis:  
de Jiŝaj ĝia spec'.  
Floreton portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floret'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

...

N. N. 32,  
En rose så jeg skyde

*tradukita de Thomas Laub*

En rose så jeg skyde  
op af den frosne jord,  
alt som os forðum spåde  
profetens trøsteord.  
Den rose spired frem  
midt i den kolde vinter  
om nat ved Bethlehem.

For rosen nu jeg kvæder  
omkap med Himlens hær:  
en jomfru var hans moder,  
Maria ren og skær.  
I ham brød lyset frem  
midt i den mørke vinter  
om nat ved Bethlehem.

Den rose fin og lille  
har dejlig duft og skær,  
den lyse for os ville  
og sprede mørket her.  
I sandhed mand og Gud,  
af syndens nød og pine  
han nådig hjalp os ud.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: [http://da.wikisource.org/wiki/En\\_rose\\_s%C3%A5\\_jeg\\_skyde\\_kaj](http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde_kaj) [http://www.ugle.dk/en\\_rose\\_saa\\_jeg\\_skyde.html](http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html). Pri Thomas Laub vidu la retejn [http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Laub](http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub).